

Ĉu rakonti novele? - de Johán Valano  
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1987

Cl.- Parolas Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Al la ĉu-serio de la krim-romanoj de Johán VALANO nun aldoniĝis volumo da krim-noveloj kun la titolo "ĉu rakonti novele?"

A.- La plej longa kaj eble originala el tiuj krim-noveloj estas la spiona rondo. Tre komplike kaj komike kombiniĝas en ĝi ludo, spionado, kontraŭspionado, detektiv-trejnado, promenigante la saman rondon en diversajn lokojn de la sama kvartalo.

Cl.- Ne eblas doni bonan impreson pri la lingvo kaj stilo de Johán VALANO per eklego el tiu tro kompleksa novelo. Kontraŭe la rakonto titolita "Kiu pafis al Pipulo?" havas ian ĉarmon, eĉ se nur parte oni legas ĝin. Ĝi eĉ estas pli kontentiga, se oni ne finas ĝin, ĉar oni ne bedaŭras la iom artefaritan konkludon, kiu subite instruas al ni, kiu estis la krimulo, memorigante, ke novelo estas mallonga rakonto, kaj ke pro tio mankis unu aŭ du paĝoj por komplete raporti pri la enketo. Saman tro abruptan finon oni trovas en pluraj aliaj krim-noveloj, kiel cetere en kelkaj krim-romanoj de Johán VALANO. Sed tio ne malhelpas la esperanto-publikon ŝati la ĉu-romanojn kaj nun la krim-novelojn "Ĉu rakonti novele?" de Johán VALANO. Ne beletraĵon deziras tiuj legantoj, sed simplan leg-amuzon.

A.- Kio agrabligas tiun amuzon, tio tute certe estas la samtempe agrable flua kaj tamen ne tute kutima lingvaĵo de la verkoj de Johán Valano. Lia moderna skrib-arto ŝokas tiujn, kiuj nur frekventis lernolibrajn tedaĵojn. Kontraŭe ĝi plaĉas al tiuj, kiuj havis la okazon partopreni junul-renkontiĝojn, kie oni iom eksperimente uzas la zamenhofan idiomon.

Cl.- Post tiuj iom banalaj rememorigoj ni eklegu al vi la novelon "Kiu pafis al pipulo?", novelon, kiu priskribas vilaĝan etoson:

A.- "La viroj! La viroj! Rapidu! Pipulo havis akcidenton!"

Cl.- "Kio?", "Kie?", "Ĉu Pipulo?", "Kio okazis?" Tumulto skuis la tutan vilaĝon, ordinare plej pacan. Demandoj sagis ĉiudirekte, sed la junulino ĵus biciklis tiel rapide, ke ŝi ne plu havis spiron por respondi.

A.- "Ĉe Kravina," ŝi fine prononcis, kaj post du profundaj spiroj ŝi aldonis: "Apud la arbarlimo. La traktoro renversiĝis sur lin."

Cl.- Kiam ili alvenis, li ne plu estis savebla. Pipulo kuŝis jam plurajn horojn morta. Sed al la ĝendarmoj, alkurintaj tuj poste, baldaŭ evidentiĝis, ke ne traktorrenverso mortigis la maljunan kamparanon. La traktoro ja renversiĝis nur, ĉar Pipulo ne plu regis ĝin. Pafite al la kapo kaj brusto, kiel li povus ĝin regi?

A.- La vilaĝo estis konsternita. Pipulon oni ne speciale ŝatis. Senedzina, seninfana, ĉiam inkлина grumbli, li ne montriĝis aparte simpatia al la lokanoj, kiuj emis riproĉi al li troan konservemon. Sed ke vilaĝanon, eĉ ne popularan, oni mortpafis, tio estis malfacile digestebla fakto.

Cl.- Kiam polica detektivo Jano Karal puŝis la pordon de la gastejo, ĉiuj eksilentis. Forte sentanta, ke ĉiuj rigardoj koncentriĝas sur lin, li iris al la bufedo kaj mendis bieron.

A.- “Silenta etoso,” li diris al la kelnerino.

Cl.- Streĉita, ŝi simple respondis. “Vi verŝajne ne scias, ĉar vi haltis nur preterpase, sed mortiga akcidento okazis hieraŭ.”

A.- “Jes, mi scias. Mi venas por enketi,” li diris.

Cl.- En la reganta senbruo, ĉiuj aŭdis lin.

A.- “Se vi venas enketi, vi ne devos serĉi longe,” kriis de apuda tablo juna fortegulo, kies mentono elstaris agreseme.

Cl.- Jano Karal prenis sian bieron kaj iris sidi apud li.

A.- “Ĉu vi permesas?” Li prezentis sin.

Cl.- La kvar, kiuj sidis ĉe tiu tablo, flustris nomojn kaj funkciojn, kiujn Jano ne precize perceptis. Nur tion li komprenis, ke la dekstre sidanta estas s-ro Ŝufarel, la vilaĝestro.

A.- “Kion vi celis dirante, ke mi ne devos serĉi longe?” Karal demandis la junulon.

Cl.- “Estas bando da krimuloj en la vilaĝo, kaj ili troviĝis apude, kiam la katastrofo okazis.”

A.- “Bando da krimuloj, ĉu vere?”

Cl.- “Jozefo aludas al la feria restadejo,” la vilaĝestro diris per voĉo agrable basa. “Tie nun troviĝas grupo da junaj deliktuloj, kaj tio ne plaĉas al ĉiu.”

A.- “Ĉu ili kaŭzis malagrabraĵojn al la loĝantaro?” Jano demandis.

Cl.- Du voĉoj respondis samtempe, la vilaĝestro, kiu diris: “Absolute ne”, kaj malgranda 50-jarulo, kun tre densaj brovoj, kiu diris: “Ili mortigis Pipulon, sed ĉu tio estas malagrabraĵo...”

A.- “Almenaŭ nun du personoj ege kontentos,” komentis la laŭtvoĉa giganto, kiu estis la unua parolinto post la alveno de Karal. “Lionél, kaj la iniciatisto.”

Cl.- “Kiu estas Lionél?”

A.- “Lionelo Arbens, la nevo de Pipulo. Li heredos la tutan bienon, inkluzive de la grundo, kie la iniciatisto volas konstrui turisman ensemblon, kio plaĉe plenigos la kofrojn de Lionel.”

Cl.- “Mi klarigu al vi,” diris la vilaĝestro. “Pipulo obstine rifuzis vendi, malgraŭ la vere allogaj proponoj de la iniciata kompanio. Mi konsentis vendi, kaj ankaŭ Berto, sed la tereno de Pipulo kuŝas inter niaj du. Sen ĝi, la iniciatisto povas fari nenion. Nun, tute certe, la nevo vendos. Estos bone por la vilaĝo. Turistoj povos multon enspezigi al ni.”

A.- “Kaj se entute devas veni fremduloj,” la malgrasulo grumblavoĉis, “pli bone turistoj monhavaj ol ŝtelista bando.”

Cl.- Dum plu daŭris tiu unua kontakto kun la vilaĝanoj, Janon impresis refoje, kiel rapide homamasoj juĝas. Tiuj homoj scias nenion pri la afero, eĉ ne vidis ian materian pruvaĵeton, sed jam definitive verdiktis: kulpas la knaboj de la feriejo, kaj neniu alia. Ĉu pro timo malkovri murdiston inter si?

A.- “Mi tuj montros, kie ni trovis la ĉaspafilon,” diris la ĝendarma serĝento.

Cl.- Ili preskaŭ atingis la randon de la arbaro. Karal sekvis sian kunulon silente en la densa kreskejo kverka, faga, ulma, ĝis la ĝendarmo haltis kaj direktis la manon al natura kavaĵo.

A.- “Jen, ĝi kuŝis tie,” la uniformulo diris, kaj li aldonis: “Ne estas dubo, ke oni pafis de ĉi tie. Estas proksime al la kampo, kaj la arboj havigas sufiĉan protekton. Krome, la pafinto sciis, ke Pipulo rigardos, kion li faras, kaj ne levos la okulojn arbaren.”

Cl.- “Kaj ĉi tie niaj kolegoj trovis la lasaĵojn, kiujn vi montris al mi en la oficejo, ĉu ne?” Karal demandis. En la ĝendarmejo oni ja vidigis al li tutan serion da kovertoj enhavantaj jen unu pecon de fadeno, jen kelkajn harojn, jen fotojn de ŝu-spuroj aŭ similajn aĵojn, kun tre preciza indiko de la loko, kie la trovaĵo estis kaptita.

A.- “Jes, kaj kiel mi diris al vi, ili estas tre multaj. La knaboj de la feriejo ludis ĉi-arbare dum la plejparto de tiu tago. La paŝspuroj sendube estas iliaj.”

Cl.- Vi aŭdis la komencon de krim-novelo de Johán VALANO. Ĝin vi povos finlegi, se vi akiras la libron “Ĉu rakonti novele? eldonita de Flandra Esperanto-Ligo. 10 aliajn novelojn vi trovos en tiu verko.

A.- Estis elsendo de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond diras al vi, ĝis reaŭdo !